


SUDFRANCIA STELO



Bulteno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono

N° 137 - 2a kvaronjaro 1996 - Jarabono : 30F

Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon CCP956-28P Montpellier
chez L. Négron 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel

CHAMBORIGAUD

Midi Libre 26 0596

Congrès régional Esperanto

Un succès en Cévennes

■ Samedi 4 et dimanche 5 mai, l'on pouvait voir le foyer rural entouré de banderoles Esperanto ainsi que des personnes arborant des "épinglettes" à étoiles vertes parcourant les rues de Chamborigaud, d'autres portant des sacs multicolores Esperanto ou même des chasubles avec slogans espérantistes.

Il s'agissait des congressistes venus des départements voisins (une quinzaine de la Drôme, principalement de Romans-sur-isère, plusieurs de l'Ardèche, une douzaine d'Arles, mêmes certains du Var et aussi de la Catalogne) pour participer au congrès des centres culturels Esperanto de la région Languedoc-Roussillon qui avait lieu cette année à Chamborigaud.

L'organisation locale avait été confiée à Jean Gauthier qui, avec la très compréhensive municipalité, permit la réussite de ce congrès.

Le temps lui-même s'était mis de la partie, puisque dès samedi, les nuages qui traversaient le pays depuis une semaine s'étaient dispersés.

Ils étaient quatre-vingts venus pour voir l'exposition faite samedi matin dans la belle salle du foyer rural.

Sur les tables, l'on pouvait voir des livres tels « Esperanto sans peine » de la méthode Assimil, « Le Défi des langues » édition L'Harmattan, « L'Homme qui a défié Ba-



bel » édition Ramsay, livres que l'on peut trouver depuis peu dans toutes les bonnes librairies.

A 15 heures, Jean-Louis Munos, maire, accueillait les congressistes, qui furent enthousiasmés par les paroles de bienvenue du maire qui ouvrait ainsi le congrès présidé par M. Henin, président de la Fédération régionale Esperanto.

Ensuite, les visiteurs purent se faire expliquer le mécanisme de la langue internationale au moyen de différents tableaux et d'une projection de cassette vidéo.

Le programme fut respecté dans son ordre : assemblée générale de la Fédération Languedoc-Roussillon, débat avec M. Libert Puig de Cata-

logne (Espagne), dîner, théâtre, film, avant que chacun regagne son hébergement pour la nuit.

A savoir que gîtes et hôtels chamborigaudois affichaient complet ce soir-là !

Le lendemain devait continuer l'assemblée générale, un petit cours pour débutants était aussi donné et la conférence avec M. Duc Gonimaz avait lieu.

Ce n'est que vers midi que les congressistes, les élus et la population présente se rendirent dans la cour de l'école maternelle, d'où un superbe lâcher de ballons eut lieu.

Le temps de les suivre des yeux, cette centaine de personnes s'achemina en voiture sur la route communale de Gibenne pour inaugurer la

rue du Dr-Zamenhof, créateur de l'Espéranto.

Moment émouvant où le maire reçut de M. Henin le livre clé de l'Espéranto « L'Homme qui a défié Babel ».

De retour au foyer rural pour prendre ensemble le verre de l'amitié, MM. Gauthier et Henin reçurent du maire et de l'adjoint à la culture, Francis Sauveur, leurs témoignages de compréhension, d'encouragement et leurs ultimes remerciements ainsi que la médaille de la ville.

Chamborigaud a vécu le temps d'une fin de semaine à l'heure espérantiste.

Symbole de pacifisme mais surtout message de tolérance !

Sur le congrès fédéral vous pourrez lire les compte-rendus des pages suivantes, mais parlons déjà de la rentrée...après des vacances que nous vous souhaitons agréables :

Rendez-vous de Septembre : Dimanche 8 : Foire des Associations à Montpellier

du 9 au 16 : Semaine internationale d'Espéranto à Sète

Dimanche 15 : Journée "portes ouvertes" au Lazaret de Sète, voir p. 8

Samedi 21 : Allée des Associations à Béziers

Samedi 21 : Inauguration de la "Rue de l'Espéranto" à St Félix de Rieurtort (09)

Samedi 28 : Réunion fédérale d'automne à Béziers (salle des associations) - voir p. 13



Tutescepte vi povos legi du raportojn pri la sama kongreso, la "eksteran" en la franca lingvo kaj la "internan" en esperanto. Fakte la du raportoj sin kompletigas. Bonan legadon ! Poste vi vidos kelkajn bildojn pri tiu sukcesa kongreso. Ni pardonpetas, se la rezulto de fotokopiado ne estas bona. Exceptionnellement, vous pourrez lire deux compte-rendus sur le même congrès, l'"extérieur" en français et l'"intérieur" en espéranto. En fait, les deux se complètent. Bonne lecture ! Ensuite, vous verrez quelques images de ce congrès réussi. Excusez-nous si le résultat de la photocopie n'est pas bon.



Depuis plusieurs mois, sur proposition de Jean GAUTHIER, la Fédération du Languedoc-Roussillon des Centres culturels pour l'Espéranto avait décidé que son congrès annuel 1996 aurait lieu les 4 et 5 mai à CHAMBORIGAUD en Cévennes.

Mr Jean-Louis MUNOS, maire de Chamborigaud avait déjà donné son accord pour

-permettre que ce congrès soit une réussite

-appeler "chemin Zamenhof" celui de Gibenne.

Le matin du samedi 4 mai, la pluie qui ne cessait depuis trois jours, s'est arrêtée

pour permettre à l'équipe d'installation de transformer en "kongresejo" le Foyer

rural que la municipalité avait mis gracieusement à notre disposition.

Patrick était venu de Tours pour aider à la préparation. Ce n'est pas la première

fois qu'il répond à l'appel de Jean pour participer à l'organisation de manifestations espérantistes (Agde, Limoux, Arles..)

Le "Foyer" pouvant être séparé en deux grandes salles, l'une avec scène pouvant contenir une centaine de chaises pour les congressistes, dans l'autre des panneaux expliquant l'espéranto étaient accrochés aux grilles. Sur un présentoir, au moyen d'un jeu de cubes de construction de mots (les affixes accolés aux racines, il était facile d'expliquer le mécanisme de l'espéranto aux personnes qui désiraient s'y intéresser.

Sur une table, devant la scène, des pochettes "Assimil" contenant des documents sur Chamborigaud, Alès, le département du Gard, le château d'Aujac à remettre aux congressistes. Des livres "l'espéranto sans peine" de la méthode assimil qui prou-

ve aux profanes (qui croient que l'espéranto est une religion, ou bien une secte et même aussi une danse) que c'est bien une langue que l'on apprend comme les autres langues, mais 5 ou 10 fois plus facilement.

Sur une autre table, sur le côté: "libro-servo" service de librairie avec des revues, des livres: Le Défi des langues, L'homme qui a défié Babel, qui existent en librairie et que les expérantistes devraient faire acquérir à leur bibliothèque municipale pour qu'ils soient "lu" par le public.... Tintin et milou, le petit prince, Astérix le gaulois, etc en espéranto.

Sur la scène et au fond de la salle, des banderoles espéranto en tissu mais surtout à l'extérieur de grandes banderoles et à l'entrée du foyer et au stand mais aussi le long des barrières au bord de la route afin que les gens de passage eux aussi voient "espéranto" et pas seulement les congressistes qui savent bien ce que c'est.

Dix, 11 heures, les premiers congressistes arrivent. Une douzaine de la Drôme (le nord du sud, comme ils disent) deux de Toulon, quatre de l'Ardèche, quatre du Roussillon, des Catalans d'Espagne... Pierre et Isabelle arrivaient du sud de l'Espagne. Ayant écourté leurs vacances pour "participer" comme ils le font depuis plusieurs années.

A 15 h. Mr le Maire de Chamborigaud (et Mr Sauveur, adjoint à la culture) accueillait les congressistes par des paroles d'encouragement très appréciées. Ensuite des vidéo-cassettes en espéranto.... Vers 17 h, conférence de Mr Llibert PUIG espérantiste Catalan-Espagnol... Le soir, après dîner, traditionnellement à chaque congrès de la région, le groupe théâtral espérantiste de Béziers présente un petit spectacle.

Dimanche 5 mai le ciel est magnifique. 10 h 30 conférence de Mr DUC GONINAZ professeur à l'Université d'Aix. en Pce 11 h 30, Sous un filet, en plein air derrière le foyer, une équipe gonflait des ballons pour le lâcher qui aura lieu à 12 h 30: Ce sont plus de 70 congressistes et une vingtaine de personnes du pays qui se rendent sur la place du village, un ballon à la main pour assister au lâcher de ces ballons multicolores qui emportent une carte postale avec l'adresse: Espéranto, ch. Dr ZAMENHOF - Chamborigaud."

Tout le monde est émerveillé en voyant les ballons pointer vers le ciel.

Il est temps d'aller au chemin de Gibenne qui est à la sortie du village, au milieu des bois, après le stade, le GCU (Groupement des Campeurs Universitaires) et près du château de Montjoie que souvent, les touristes viennent voir.

C'est à cet endroit très pittoresque que les voitures se rendent,; d'autres personnes y allant à pied. Nous y trouvons Mr BORE, de Chambéry (espérantiste qui recense l'histoire des plaques de rue "Zamenhof et Espéranto") assis au bord du chemin devant la plaque voilée, nous disant: j'attends depuis ce matin pour ne pas manquer l'inauguration de la 129^{ème} plaque en France.

Le dé clic des appareils photo !! au moment où Mr le Maire (assisté de l'Adjoint à la culture, de l'organisateur local et du Président de la Fédération) dévoile en disant: "en vertu des pouvoirs qui nous sont conférés, ce chemin qui jusqu'à présent se nommait "chemin de Gibenne", s'appellera chemin Docteur ZAMENHOF " Applaudissements !!!

Le Président HENIN offre au Maire le livre "L'Homme qui a défié Babel "

Retour au Foyer Rural pour le vin d'honneur offert par la municipalité

(C'est à ce moment là que l'on aurait dû dire: nous nous rassemblerons sur les escaliers devant "la kongresejo" pour la photo souvenir.. Ce fut un oubli.. et l'on ne reverra pas de si tôt une centaine de personnes sur la photo d'un congrès de cette région.)

Pour le repas, quelle tablée !!!! 70 personnes....

Pour avoir un autre souvenir Jean fait circuler un papier sur lequel chacun a inscrit ses coordonnées...

Ainsi ceux qui étaient présents pourront dire: J'y étais.

Le repas ayant duré trois heures, nombreux sont ceux qui étaient assez pressés et n'ont pu ensuite participer à la visite du point de vue sur la mine à ciel ouvert, du Château de Portes et du viaduc ...

Ce fut un plaisir pour ceux qui ont pu y aller. Le temps manque toujours !!!! Mais tous ceux qui ont pu apprécier la beauté de la région savent à présent qu'il y a possibilité d'agréables séjours à faire par là. Ils y reviendront; S'ils le désirent, nous serons toujours prêts à les aider.

(En citant le nombre de personnes nous risquons d'en oublier, ce qui est toujours gênant.)

(Sont donc arrivés aussi samedi soir ou dimanche matin: trois ou quatre personnes de Nîmes)

(trois ou quatre de l'Aveyron, une douzaine de personnes d'Arles, trois de Alès....

Federacia Kongreso en Chamborigaud (4-5 V 96)

(post du anoncoj en "Midi Libre" kaj ĉe loka radio-elsendo).

Multaj ni venis, el la Regiono sed ankaŭ de Ardèche, Aveyron, Bouches du Rhône, Drôme, Isère, Loire, Savoie, Var, Vaucluse kaj ankaŭ de Suda Katalunio. Ĉiuj estu gratulitaj kaj dankitaj !

Sabaton posttagmeze : La urbestro akceptas la kongresanojn kiuj, poste, ĝuas 2 filmojn : "Post 20 jarcentoj" kaj "Angoroj". Pro tempomanko la tria (E° tra la mondo) estis prokrastita ĝis 1997.

Ĝenerala kunveno - Bilancoj : komenciĝas je la 17.30. Agrablan interkonatiĝon estras J. Hénin. Sendis salutojn al la kongresanoj : R. Perault nome de UFE, Sro Lllech-Walter de Perpignan, Ges. Mansel de Nouméa. Silentminuto estas petata omaĝe al P. Basco kaj Valo.

1-financa raporto (de Januaro ĝis Decembro 95) . S-ino Négron disdonas la folion, kiu entenas la en-kaj el-spezojn (i.a. tiujn de la kampanjo apud la mezgradaj lernejoj -vidu la numeron 136 de SFS). Aprobite.

2-Morala raporto.

-Staĝoj : 24-28a de Majo 95 en Agde kaj 9-16a de Septembro 95 en Sète. Ambaŭ sukcesaj. Fine de la 2 staĝoj estis organizitaj sesioj de naciaj sed ankaŭ internaciaj (en Sète) ekzamenoj.

-Foiroj de la asocioj : en Agde, Béziers, Montpellier, Nîmes. Ni partoprenu ! Materialo (paneloj, banderoloj, libroj...) estas prunteprenebla.

-Ni reliefigu iniciaton de la lernantoj (duagrada nivelo) de S-ino Authier, kiuj skribis al "Arte" kaj al la "5a" por reklami la kurson "Mazi en Gondolando" kaj al Sat, Ufe, por ke ili petu la saman agadon de la Germanaj Esperantistoj.

-Pri la peticio sendita al la Eŭropa Parlamento : ĝi estis atentita kaj ricevis la referencon 323/96. La raporto estas aprobita.

Prelego de S-ro Llibert Puig (el Suda Katalunio) : pri solidareco.

En la komenco estis la "interna ideo" de Zamenhof. Hodiaŭ, ĉar Eŭropo estas nia celo, sen forlasi nian identecon, ni bezonas unuigon por pli da forto kaj la "internan ideon" postvenis ne la interfratiĝo, iomete kaduka -pro politikaj kaŭzoj, oni ne estas fratoj - sed la solidareco; kaj Esperanto estas ŝlosilo. L.P. citas la ekzemplon de C. Cayzac, kiu gvidis perkorespondan kurson kun Afrikanoj kaj aktualajn agadojn :

-ĉefe la organizon de la alveno de Bosnaj infanoj en Katalunio, ebla post multaj intervenoj de Katalunoj kaj Bosnoj dank'al la subtenoj de la registaraj instancoj,

-la agadon de la Argentino Atilio Orellana Rojas apud Afrikanoj.

B. Legeay indikas, ke Toulouse organizas la alvenon de infanoj el Ĉernobil. Helpo estas bezonata.

Sabaton vespere:

Oni ĝuis teatraĵeton "La forpasinto" de Obaldia, tradukita de G. Lagrange kaj ludita de S. Authier kaj F. Terral kaj filmon pri Egiptio dank'al F. Terral.

Dimanĉon matene:

Ĝenerala kunveno, projektoj :

(Paralele, antaŭ la kongresejo kaj meze de la dimanĉa bazaro, budo kaj teamo de J. Gauthier akceptas - tion ili jam faris la antaŭtagon - ĉiujn scivolemulojn/ interne, en alia salono "Mazi").

-Vizitoj de eksterlandanoj antaŭviditaj : de Dagestano en Katalunio / de Bosno en Toulouse.

-nova prezo de abono al SFS : 35 F . Konsentite.

-97 : Federacia Kongreso en Suda Katalunio en **Figueres** . Ĝi povus esti la kongreso de Suda Francio kun la federacioj de Provenco kaj Sud-Pireneoj. L. Puig indikis la akcepton de la urbestro kaj la proponitan daton : de la 1a ĝis la 4a de Majo 97, substrekante, ke unu el la vidindaĵoj estas la muzeo de S. Dali (kies patro, ankaŭ nomita S. Dali, estis esperantisto en la komenco de la jarcento), ke la gejunuloj estas multnombraj. Perpignan-anino rimarkigas, ke eĉ se la proksimeco de la kongres-urbo plaĉas al ŝi, ŝi dubas pri la valoro de la propagando pri E°...en Francio ! Tamen la projekto estas konsentita.

-98 : **UK en Montpellier** .

Louis Ensuque memorigas la ĉefajn etapojn :

. En Junio 95 dum la Nacia Kongreso en Parizo : kandidatiĝo de Montpellier proponita de li.

. En Septembro 95 : telefon Alvoko de C. Nourmont, kiu petas dosieron. Ĝi estas sendita al R. Triolle, vicprezidanto de UEA, R. Perault sekretario de UFE.

. 21an, 22an de Marto 96 : vizito de O. Buller, nova ĝenerala direktoro de UEA kun C. Nourmont ; ili vizitas la urbestron de Montpellier kaj la komercan direktoron de "Le Corum", alinome "Palaco de Kongresoj" (vidu la foton p. 7).

.En Aprilo 96 la urbestro de M. ricevis leteron de UEA. Eĉ se neniu alia dokumento oficialigas la aferon ariĝis LKK : Komitato de la 83a U.K. de Esperanto (asocio laŭ franca leĝo 1901); jen komenco de la listo : Prezidanto : L. Ensuque; Vic-prezidantoj : Y. Viérne, J. Bony; sekretario : L. Ensuque kaj Gisela Passarella (protokoloj); kasisto : G. Passarella. Du leteroj estis senditaj petante helpon de ĉiuj esperantistoj.

Reagoj :

.S-ro Capus, el Montpellier, pro sanproblemo kaj aĝo ne aniĝis la komitaton sed estas preta helpi dum la UK.

.Ges. Touron, el Nîmes, aniĝas la komitaton, proponas helpon dum la UK, krom ĉe la giĉetoj.

.S-ro Berthonneau el Bages proponas deĵori kiel kuracisto dum la UK; li ankaŭ proponas hejman helpon de S-ino Berthonneau por la sekretaria laboro, tajpado.

.S-ro Paing, el Olargues, proponas pripenson pri faldfolio por instigi gejunulojn partopreni tiun UK, disdonota dum Foiroj de Asocioj.

.S-ino Olek, el Olargues, petas aperon de informoj pri la U.K. en SFS por instigi ĉiujn. J. Bony estas jam preta fari tion, ŝi atendas nur la oficialigon.

.Proponoj, informoj estos sendotaj al Louis Ensuque.

-99: Katalunio kandidatiĝos por la 4a Eŭropa Kongreso (post Verono 93, Parizo 95, Stuttgart 97).

Kiel konkludo de la kunveno :

-danko de S-ro Riste el Romans, kiu asertas, ke li multe lernis dum la kunveno,

-vorto de S-ro Latapie el Lunel, kiu ĝuis speciale la prelegon de L. Puig kaj vidas en la U.K. okazon konvinki kaj entuziasmigi.

Prelego de Profesoro Duc Goninaz el Aix en Provence : "Rajto je komunikado kaj lingva libereco, ĉu diverĝaj celoj ?". Riĉa prelego, kiun oni ne povas resumi. Eble unu el la personoj, kiuj surbendigis la prelegon bonvolos disponigi kopion por la federaciaĵoj.

Lanĉo de aerbalonoj : kun poŝtkartoj, kiuj invitas la kaptontojn sendi mesaĝon al la sendintoj.

Inaŭguro de "Chemin Zamenhof" fare de la urbestro, kiu ricevas de la federacia prezidanto la belan libron "l'homme qui a défié Babel".


Honorvino en la Kongresejo : la urbestro dankas nin kaj ĉefe S-ron Gauthier pro la elekto de Chambo-rigaud. S-ro Sauveur, la adjunkto pri kulturo, donacas 2 medalojn de la urbo al S-roj Gauthier kaj Hénin.

Tagmanĝo : 70 partoprenintoj !!! Al tiuj, kiuj tiel laboris...telefonis...skribis...faksis...veturis, t.e. S-roj Gauthier kaj Hénin, ni diru : Dankon .

Jeannine Bony.



Sincerajn dankojn al tiuj, kiuj sendis fotojn post la kongreso por ilustrati tiun SFS kaj tiel memori pri tiu verda semajnfino. Specialan dankon al nia amiko Jacques Tourtois el Valence, kiu filmis la diversajn partojn de la kongreso kaj muntis 17minutan filmon. Eĉ se la geaktoroj ne estas profesiaj, la videokasedo estas je via dispono ĉe SFS, ĉu por revivi la kongreson, ĉu por senti la etoson kaj tiel pretiĝi por la kongreso de Figueres en Majo 97, kongreso kiu estos multe pli ampleksa kaj samtempe internacia.



En Chamborigaud : lanĉotaj balonoj...kaj lanĉitaj balonoj.



Malfermo de la kongreso; de dekstre staras Sro Munos, urbestro, kaj Sro Sauveur, adjunkto pri kulturo



Homamaso atendas la inaŭguron de la vojeto "Doktoro Zamenhof"




La urbestro ĵus senŝualigis la panelon



La prezidanto de la federacio (dekstre) gratulas la urbestron kaj donacos al li la libron "L'homme qui a défié Babel". Meze staras Jean Gauthier, la organizinto de la kongreso kaj iniciatinto de la panelo


Kompreneble, se Dro. Zamenhof mortis en 1917, la lingvo Esperanto daŭre vivas...



La kongresanoj atente sekvas la prelegon de Profesoro Michel Duc Goninaz.

HERALDO, la konata "internacia sendependa gazeto de la esperanto-movado" raportis detale (n° 10 de la 5a de Julio) pri la inaŭguroj en Chamborigaud kaj Aix-en-Provence (unua paĝo !) kaj pri aliaj eventoj en nia granda regiono. Dankojn al la raportintoj kaj al la geaktivuloj !

Du pliaj Zamenhof-Esperanto-objektoj en Francio



La 4-an kaj 5-an de majo okazis respektive en Aix-en-Provence inaŭguro de Zamenhof Monumento kaj en Chamborigaud - Zamenhof-arbara vojo.

Sur la unua foto (de R. Boré): la urbestro de Aix, Jean-François Picheral (dekstre) kaj Daniel Moirand senvualigas la monumenton el rozkolora granito de la Clarté (Côtes d'Armor). La maldekstra parto mezuras 100 X 60 cm., kaj la dekstra 110 X 100 cm. La dikeco, por ambaŭ partoj, estas je 40 cm. La rondforma elbrona medaliono (40 cm) estas kreita fare de skulptisto Jean-Pierre Dubois kaj tute similas tiujn en Pau kaj Chambéry. Sur la monumento estas skribite, en Esperanto kaj en la franca "Al L.L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, 1887". La monumento en Aix estas starigita komence de la "Rue des espérantistes".

Daniel Moirand kaj Michel Duc-Goninaz instruas Esperanton en la Universitato de Aix-en-Provence.

Sur la dua foto: la unua en Francio traarbara vojo kun la oficiala nomo "Zamenhof". Certe verduloj ne plendos pro tio! Kaj se kelkaj el ili dezirus danki la urbestron, jen lia adreso: **S-ro Jean-Louis Munos, urbestro, FR-30530 Chamborigaud.**



Septembre, Esperanto-sirato en Saint-Felix

La 21-an de septembro en Saint-Felix -de-Rieutort, Francio, inter Tuluzo kaj Andoro, okazos inaŭguro de Esperanto-strato, kun partopreno de Raymond Boré por prelego, Jomo (Esperanto-rok-ensamble) por koncerto, 3 kantistoj el Katalunio kaj espereble pluraj geesperantistoj. Oni povas gratuli al la **urbestro: S-ro Serge Gay, Mairie, FR-09120 Saint-Felix-de-Rieutort** (Sur la foto li staras tute maldekstre). Meze, portanta ankaŭ la stratŝildon, Zdravka Bojčeva el Bulgario, la horestrino. Inf.: **Jorgos, 7 rue de l'Esperanto, FR-09120 Saint-Felix-de-Rieutort, Francio.**



Bildoj dekstre sur p. 7

Foto 1: Vizito al Montpellier, sudfranca urbo, kie en 1998 okazos la 83-a UK. De maldekstre: Osmo Buller - Ĝenerala Direktoro de UEA, Claude Nourmont - prezidanto de UFE, C. Charbaut - komerca direktoro de la kongresejo "Le Corum", Yvette Vierende - vic-prezidanto de la LKK. (Sendis Jeannine Bony)

Foto 2: Ankaŭ sudkatalunaj geesperantistoj el Lleida, Manresa, Sabadell kaj Terrassa partoprenis la omaĝon al la nordkataluna Renat Llech-Walter, okaze de lia 90-a naskiĝdatreveno, okazinta en la Kongresa Palaco de Perpignan komence de majo. Sur la foto: Libert Puig, estrarano de KEA gratulas la omaĝaton. (Foto Albert Carbonell)

Foto 3: Jam de multaj jaroj Centro de Esperanto Sabadell partoprenas en la loka libro tago, la tagon de Sankta Georgo, kataluna patrono. Loka ŝparkaso "Caixa de Sabadell" disponigas senpagajn budojn por librovendejoj kaj kulturaj asocioj en la urbocentra ĝardeno. En la foto: diversaj esperantistaj generacioj. (Foto Glòria Torras)

Foto 4: Rezentantoj de KEA partoprenis en la Kongreso de Langvedoko-Rusillono (Francio), en Chamborigaud. Sur la foto: L. Puig prelegas al la kongresanoj, atente observata de Jean Henin, prezidanto de la organiza Federacio. (Foto A. Carbonell)

NIA FILMO



UK 98

La angulo de la LKK

Montpellier famiĝos en 1998, ne nur pro la futboloaĉoj de la monda poka -lo (en 10 francaj urboj, en Junio kaj Julio) sed ankaŭ pro la Universala Kongreso de Esperanto dum la unua semajno de Aŭgusto.

La afero estas nun oficiala. UFE menciis ĝin sur la unua paĝo de "Franca Esperantisto" de Majo. Sur la foto oni rekonas la faman "Peyrou", kiu simbolo la UK sur la glumarko, disponebla dum la UK de Prago, same kiel grandformataj afiŝoj. Suno, maro, vino (vinberoj) estas aliaj allogaĵoj de nia regiono, videblaj sur la glumarko.

Kulpas pri la desegnaĵo Bernard Legeay.

Jam estas rezervitaj la kongresejoj : Corum (de UEA) kaj Rabelais (de LKK). Ŝvitigonta tamen tuj venonta : la buĝeto !

Notinde kaj imitinde : Ni notu la malavarecon de du Montpelleranoj, kiu faciligos la laboron de la LKK, pere de donaco de 5000 F kaj alprunto de 10 000 F. Ili estu gratulitaj kaj kore dankitaj.



FRANCA ESPERANTISTO
revue française d'espéranto

commission paritaire n° 61 003
ISSN 0778-7888
N° 495 - 1996
mai 1996

La 83-a Universala Kongreso de UEA en 1998 okazos en Montpellier

Okazo de la centjariĝo de la Esperanto-movado (1888-1988) fondiĝo de SPPE - la UK okazos en Montpellier. La 83-a Kongreso en Francio okazos de Marsailjo en 1998.

Midi Libre ■ Mardi 25 juin 1996 ■

Pignon sur rue

Congrès espéranto

■ Le 83e congrès universel d'espéranto se déroulera à Montpellier du 1^{er} au 8 août prochain. Entre 2 000 et 3 000 congressistes sont attendus, qui viendront d'une cinquantaine de pays des cinq continents pour parler du devenir de cette langue universelle... en espéranto évidemment.

Occasion pour les intéressés et les curieux de s'initier et de se renseigner. "Midi Libre" reviendra, en temps voulu, sur les différentes déclinaisons de ce congrès ; mais contact peut être pris, pour tous renseignements, dès aujourd'hui au siège social montpelliérain (tél. 67.54.15.43.).

L'ESPÉRANTO EN CONGRÈS AU CORUM

La Gazette n° 420. Avril 96

L'association universelle d'Espéranto a choisi Montpellier pour tenir son congrès en 1998 : il rassemblera 4 000 personnes du 1^{er} au 8 août au Corum.

*Ĉu la Montpelleraj gazetoj estas iom...Marsejlecaj ?
Kompreneble la UK estis antaŭvidita por 98 en Montpellier kaj, ĉrom miraklo, partoprenos inter 2 kaj 3mil esperantistoj el la 5 kontinentoj.*

VIVO de la GRUPOJ :

Béziers

Jen somero kaj la fino de niaj monataj kunvenoj ĝis septembro. Notu bone la datojn de la venontaj :
-la 14an de Septembro, je la kutimaj horo (14h30) kaj loko (Maison des Associations) ni diskutos :

- 1e) pri la organizo de nia budo en "Aleoj de Asocioj", la 21an de septembro, dum la tuta tago
- 2e) pri la organizo de la kursoj

-la 12an de oktobro, la programo estas precizigenda.



Ne estos individuaj kunvokiloj (perletere aŭ telefone). Konservu tiun artikoleon.

Staĝo en Batipaume: Ĝi okazis de la 12a ĝis la 16a de junio. Krom pluraj fideluloj venis novaj staĝanoj, kelkaj eĉ de malproksime : Strasbourg, Bretagne, Savoie. Aparte estas menciinde, ke la departemento Isère meritas gratulojn pro la plej granda nombro da partoprenintoj.

La kursoj bone disvolviĝis : S. Bernard gvidis la unuagradan kun 5 gelernantoj el kiuj 3 estis veraj komencantoj. J. Turbillon, ĉiam vigla, gvidis la 2agradan kaj J. Vincent, majstre, la 3agradan. La 14 gelernantoj multe diskutis, bonhumore, pri la rimarkinda teksto de Jean Ribillard. Do studo serioza por ĉiuj.

Antaŭ la matenmanĝo, la kuraĝuloj ĝuis jogon sub la direkto de D. Bénazech. La "estontaj artistoj" trejniĝis pri akvarelo dank'al la kleraj konsiloj de J-P. Peray (eĉ konkurso kun premioj por la pentristoj). Dankojn al ĉiuj !

La staĝo tiom plaĉis ke, ĉe la fino, pluraj petis ke, venontjare, la staĝo plenigu **la tutan semajnon**. Se la estraro de Batipaume konsentos, ni provos tiun novan formulon, **la lastan semajnon de majo**.



NDLR : Gratulojn al la organizintoj, la instruintoj kaj la lernintoj ! Ni ĝojas pri la bonsukceso de la staĝo de Batipaume kaj pri dua "semajno" en nia federacio.



PERPIGNAN (Vidu ankaŭ p.)

Lastfoje vi legis la leteron de Lieve Vervoort (ne forgesu, ke ŝi atendas viajn reagojn pere de la loka klubo). Ĉifoje ŝi donas la rezultojn de enketo apud 50 gelernantoj :

*Ĉu vi jam aŭdis pri esperanto ? Jes : 28 Ne : 22

*Ĉu vi scias, ke esperanto estas pli facile lernebla ol iu ajn lingvo ? Jes : 3 Ne : 47

*Ĉu vi scias, ke ekzistas en la ĉefaj urboj tra la mondo reto de esperantistoj, kiuj regule kunvenas kaj volonte akceptas esperantistajn vojaĝantojn ? Jes : 9 Ne : 41

*Ĉu vi scias, ke ĉiujare okazas ie en la mondo internacia kongreso de esperanto, kie la partoprenantoj el la tuta mondo amuziĝas kaj interŝanĝas ideojn en tiu komuna, neŭtrala kaj simpla lingvo ? Jes : 9 Ne : 41

*Kiu, laŭ vi, devus esti la lingvo de Eŭropo? la angla?(18) la franca? (17) la germana? (0) esperanto? 3 alia lingvo? (hispana : 2, kataluna : 1) sen opinio : 11 (*NDLR : la tuto superas 50*)

*Ĉu esperanto devus esti akceptata en la bakalaŭro kiel elektebla lingvo ? Jes:24, Ne:8, Sen opinio:18. *Kompreneble la rezultoj estas nur indiko. Mirige, preskaŭ la duono de la demanditoj akceptus esperanton en la bakalaŭro kiel elekteblan lingvon. Aliflanke multaj scias malmulte pri esperanto kaj la triono proponas la anglan kiel lingvon por Eŭropo, eble ĉar ili ne konas alian lingvon. Pri tiu punkto, Lieve konkludas : " Ĉu ili estas ĉiuj frenezaj aŭ simple ankoraŭ iom naivaj ?"*



Internacia Semajno en Sète : de la 9a ĝis la 16a de Septembro 1996.

Jam 35 aligintoj el 5 landoj. Certe aliĝos 20 pliaj el aliaj 5 landoj.

Se vi volas ĝoji internacian babiladon, vi povas veni en Lazaret (rue du Pasteur Benoît, kvartalo la Corniche) dimanĉon la 15an de Septembro, la tutan tagon aŭ parton de la tago. Vi ne bezonas pagi aliĝon ! Vi estos bonvenaj; ni planas programon por vi.

Vi povos tagmanĝi kun ni, kondiĉe ke vi antaŭmendu ĝis sabato la 14a de Septembro al la jena adreso : Yvette Vierne -Espéranto, Le Lazaret - rue du Pasteur Benoît - 34200 Sète. Se vi preferos, vi povos pikniki sur la strando.

NDLR : Jen interesa propono : renkonti esperantistojn el diversaj landoj en Sète en Septembro, eĉ se vi ne partoprenos la konatan "Semajnon". Venu multnombro, almenaŭ por kelkaj horoj kaj ne forgesu antaŭmendi!

MONTPELLIER

★★

La grupo dufoje trafita

La esperantista Klubo de Montpellier perdis du fidelajn kaj malnovajn amikojn :

-Jacques Lecroisey forpasis en Parizo la 3an de Majo. Li estis 84jaraĝa. Jacques Lecroisey lernis esperanton antaŭ pli ol 45 jaroj (mi trovis de li tradukitan tekston eldonitan en 1952). Esperantisto ĝisoste, li kaptis ĉiujn okazojn por propagandi dum siaj multnombraj vojaĝoj, pli ekzakte pilgrimoj. Kiom da kilometroj li trakuris ĉu bicikle ĉu petveturante !

Jacques Lecroisey kreis la asocion "Pilgrimantoj por kaj per esperanto", por kiu li redaktis bultenon, kie poezio havis gravan lokon. Li vizitis multajn kongresojn aŭ renkontojn. Ĉu alian esperantiston oni vidis pli ofte dum la esperanto-okazintaĵoj ?

-sammonate Suzanne Lentaigne forlasis nin. Leo kaj Suzanne lernis esperanton antaŭ pli ol 60 jaroj. Ili konatigis dank'al ĝi kaj ambaŭ restis fidelaj al E°.

Suzanne estis la fidela, diskreta, efika duono de Léo, tiel ŝi ebligis, ke Léo faris tiun grandegan laboron. Ni memoras ŝian bonkoran rideton kaj afablajn parolojn.

Yvette Vierne

SFS kondolencas al ambaŭ familioj kun speciala penso por nia kara amiko Leo.

★★

Kunvenoj:

En la kunveno de la 22a de majo en La Paillade partoprenis nur 5 personoj. Ni parolis precipe pri la forpasoj de Jacques Lecroisey kaj Suzanne Lentaigne -ni forte bedaŭras ilian malaperon- kaj pri kelkaj aliaj negravaj temoj.

En la kunveno de la 19a de Junio (en MPT l'Escoutaire) partoprenis...mirige...ĝis 20 homoj sed kelkaj foriris antaŭ la fino aŭ alvenis post la komenciĝo. Alvenis juna homo, kiu lernas esperanton nur de 10 tagoj kun L. Lentaigne. Ĉeestis 2 gelnantoj de J. Bony kaj virino, kiu lernis e-on en 1939. Ni ĝisdatigis la kursojn por la venonta jaro (vidu ĉi-poste) kaj decidis partopreni en iu helporganizito pri tradukado en diversaj lingvoj. La venonta foiro pri asocioj okazos en Montpellier la 8an de Septembro. Ni informis rapide la grupanojn pri la lastaj faritaj taskoj koncerne la preparadon de la UK en 98 : rezervo de Corum, de la salono "Rabelais", elekto de la anoncafiŝoj kaj de la glumarko.

La Kultura Centro de Montpellier:

Adreso ĉe la prezidanto : 5, Rue du Docteur Roux 34000 Montpellier Tel: 67 54 15 43

Prezidanto : Yvette Vierne " " "

Sekretario : Louis Ensueque, 7 Rue Gustave 34000 Montpellier Tel:67586418 (hejmo), 67074262 (oficejo)

Kasisto : Annick Tora, Rés. Les Pins, CD17, App.13, 1577 Av.de Maurin 34070 M Tel : 67 69 11 32

Aliaj membroj, kiuj volonte informas :

Jeannine Bony , Rés. Près d'Arènes 2, App.36, 247 Rue F. de Lesseps 34000 Montpellier

André Capus, 15 Rue des Frères Platter, 34000 Montpellier Tel : 67 63 15 21

Armand Diez, 514 Rue de l'Aiguelongue, 34000 Montpellier Tel : 67 63 23 36

Adrien Defoly , 28 Rue du Mocadou, 34670 Saint Brès Tel : 67 70 28 27

Pierre Martinez, 56 Avenue Gustave Charpentier, 34970 Lattes Tel : 67 65 30 56

Rosa Aumenier, Le Diamant Bât.B app.40, 33 Place d'Acadie 34000 M Tel : 67 22 37 24

Monataj kunvenoj : la unuano merkredon de la monato, de oktobro ĝis junio (se tiu merkredo estas dum lernejoj ferioj, la kunveno estas prokrastita ĝis la merkredo post la lernejoj ferioj) je la 18a h.

-ĉu en Centre Social de la Caisse d'Allocations Familiales, 410 Av. de Barcelone, 34080M-La Paillade
-ĉu en Maison pour Tous l'Escoutaire, Rue des Razeteurs (Quartier Saint Martin) en Montpellier

Kursoj :

Tago Horaro Loko Nivelo Respondecas

Mardo	9.30-10.30	MPT George Sand	dua grado	Adrien Defoly
Mardo	18-19 h.	MPT l'Escoutaire	komencantoj	Jeannine Bony
Vendredo	9-10.15	MPT l'Escoutaire	komencantoj	Pierre Martinez
Vendredo	10.30-12	MPT l'Escoutaire	tria grado	Rosa Aumenier

Mende

Céline Robert, dokumentistino en la profesia liceo M. Peytavin, aranĝis dusemajnan ekspozicion pri esperanto en Junio en la liceo. *Ni gratulas ŝin.*

Adiaŭ ! Carine estis preskaŭ 20jaraĝa. Stulta trafikakcidento forprenis ŝin antaŭ kelkaj tagoj de ŝia familio kaj ŝiaj geamikoj. En Alès kaj Arles ŝi ludis teatraĵetojn kun du amikinoj okaze de niaj federaciaj kongresoj. Ni ne plu vidas ŝin, ni ne plu aŭdos ŝin kaj ni malĝojas. Adiaŭ, Carine ! J.H.

Rodez

Bernard Legeay aktivas en la kolegio Fabre, kie li starigis E^o-klubon kun 15 gelernantoj. Li profitis la viziton de la kantisto Jacques Yvart por venigi ĵurnalistinon de "Centre Presse" al la kolegio. Ŝi fakte kondukis malafable kaj malĝentile. Kiam ŝi demandis, kun iu subideo, al la infanoj, kial ili deziris lerni esperanton, tiuj-ĉi lerte kaj vigle trovis tute taŭgajn respondojn. Ĉi-malsupre vi trovos la franclingvan tekston (iom longan sed bone argumentitan) donitan al la ĵurnalistino kaj la finan rezulton. Menciinde, ke Sro Poudou, vicestro de la kolegio kaj amiko de Jean Hénin, ege helpas por la starigo de tiu klubo kaj disponigis vidmaterialon, li ankaŭ antaŭvidis buĝeton por la klubo en la venonta jaro; tio ebligas la aĉeton de libroj, vortaroj aŭ metodoj por la gelernantoj.

Jacques Yvart kantis la 23an de Majo en la domo por gejunuloj kaj kulturo (MJC) antaŭ ravita dudekpersona publiko. Malgraŭ anoncoj en diversaj gazetoj antaŭ la koncerto, neniuj ĵurnalistoj sin prezentis dum la koncerto kaj sekve ne aperis raportoj.

Gratulojn al nia agema amiko en Rodez; ni deziras bon sukceson al la nova klubo en la kolegio Fabre.

Deĝstre la teksto donita al la ĵurnalistino, maldeĝstre la artikolo aperinta...

Deĝstre de la bildo B. Legeay, maldeĝstre Jacques Yvart.

Au collège Fabre, l'espéranto, langue internationale



Depuis un mois environ, dans le cadre des activités du foyer socio-éducatif du collège Fabre de Rodez, s'est mis en place un club d'espéranto qui, sous la conduite d'un bénévole, M. Bernard Legeay, vise à enseigner la langue internationale à une quinzaine d'élèves de 6^e et 5^e.

Le but du club est de permettre à ses participants d'acquérir les bases de la langue afin de correspondre, soit en groupe, soit individuellement, avec des jeunes du même âge à travers le monde, où existent des initiatives similaires ; dès lors, il est envisagé de contacter des clubs au Tadjikistan, au Brésil, aux Pays-Bas, etc., et cette idée peut être réalisée très rapidement.

barrière de la langue.

Et si les membres du club le souhaitent ou du moins restent assez courageux pour continuer, car il faut tout de même un peu travailler, il pourra être envisagé, de faire se rencontrer les futurs correspondants. Tout au moins ceux-ci pourront-ils le faire d'eux mêmes plus tard et ainsi voyager et aller à la rencontre des autres. Il existe en effet des réseaux d'adresses d'espérantistes dans de nombreux pays du monde, proposant soit l'hébergement gratuit, soit une aide dans le pays visité et pour des jeunes souvent peu fortunés, c'est un moyen extraordinaire de voyager et de rencontrer d'autres cultures sans être bloqué par la

barrière de la langue. Depuis un mois environ, dans le cadre des activités du foyer socio-éducatif du collège Fabre de Rodez, s'est mis en place un club d'espéranto, qui sous la conduite d'un bénévole, monsieur Bernard Legeay, vise à enseigner la langue internationale à un groupe d'une quinzaine d'élèves de 6^e et 5^e. Le but du club est de permettre à ses participants d'acquérir les bases de la langue afin de correspondre, soit en groupe, soit individuellement, avec des jeunes de même âge à travers le monde, où existent des initiatives similaires, dès lors, il est envisagé de contacter des clubs au Tadjikistan, au Brésil, aux Pays-Bas, etc., et cette idée peut être réalisée très rapidement. En effet un des avantages de l'espéranto, langue créée il y a un siècle par le docteur Zamenhof, est d'avoir, par rapport aux langues dites "naturelles", un temps d'apprentissage de 5 à 10 fois plus rapide, du fait de sa grammaire et de sa conjugaison très simples, logiques et rigoureuses, de sa phonétique et de son écriture sans exceptions et surtout pour les jeunes de son aspect ludique. Ainsi la langue fonctionne un peu comme un jeu de lego, assemblant racines, préfixes, suffixes et terminaisons toujours suivant le même schéma logique. De plus, la méthode d'enseignement utilisée au club est une méthode directe de conversation basée sur le principe d'un jeu de rôle inspiré des personnages des aventures d'Asstérix, ce qui ne peut que rajouter au côté jeu et plaisir aux enfants.

Un autre aspect intéressant de l'espéranto est son rôle prophétesque, la structure logique et rigoureuse de la langue aidant à mieux assimiler les schémas des autres langues. L'espéranto ne se conduit donc pas comme un concurrent des langues nationales enseignées dans nos écoles, mais plutôt comme un langage auxiliaire, qui a surtout l'intérêt de mettre deux individus de langue différente sur un pied d'égalité.

Un autre aspect intéressant de l'espéranto est son rôle prophétesque, la structure logique et rigoureuse de la langue aidant à mieux assimiler les schémas des autres langues. L'espéranto ne se conduit donc pas comme un concurrent des langues nationales enseignées dans nos écoles, mais plutôt comme un langage auxiliaire, qui a surtout l'intérêt de mettre deux individus de langue différente sur un pied d'égalité.

Jacques Yvart

De mer et d'amour...

La mer, la paix, l'amour, la chanson française, la fraternité, l'espéranto, l'humanisme, la poésie.....

Quelques mots pour faire le portrait de ce disciple de Brassens.

Mais les mots ne suffisent pas pour décrire un chanteur comme

Jacques YVART.

... Jacques Yvart ...

Jacques Yvart, chansonnier du monde



Invito al "terglob-amantoj" por malko-vri la Cevenian flaŭron laŭ la pied-migraj padoj sub la gvidado de fakulo pri botaniko, ankaŭ por babili agrable kaj interŝanĝi informojn pri ekologio, ideojn ...Malfeliĉe la invito alvenis tro malfrue por la lasta SFS kaj tro frue por tiu-ĉi; la renkonto disvolviĝis mez-Junie... Se vi veturos inter Alès kaj Ardeŝo, haltu en tiu bela vilaĝo kaj vizitu Ana kaj Ljo en Lafigère apud Malarce. Ili regule organizas similajn renkontojn.


Surteriĝis en Majo en St Félix de Rieutort ĉe Jani kaj Jorgos ĉarma Jasmine. Ni gratulas la gepatrojn kaj deziras longan kaj feliĉan vivon en Esperantio al la bebo.

Pri E° en Ariège kaj la internacia ĥorstaĝo en Montferrier detale raportis "Le Journal de l'Ariège".

Tie oni atendas vinla 21an de Septembro por la inaŭguro de la strato de esperanto. Partoprenos Jomo por koncerto, 3 kantistoj el Katalunio kaj Sro Boré, fakulo pri Zeoj, prelegos.

Pro la karaktero de tiu-ĉi numero (detala raporto pri la federacia kongreso), ni devas prokrasti ĝis la venonta SFS en oktobro la kontribuojn, kiujn afable sendis pluraj legantoj kaj pardonpetas de ili.

↑ Jacques Yvart faris turneon tra Francio, laŭ la invito de diversaj esperanto-grupoj. Li haltis en Aveyron (Rodez), ankaŭ en Ariège kaj Toulouse



FAMILIA CONTE-ETESSE
2, rue de l'Esperanto
F-08100 ST-PIERRE
TEL: 03 04 81 400 000

SOLIDARECO, Katalunio kun Bosnio kaj Afriko Toulouse kun Ukrainio

Dimanĉon la 7an de Julio, post multaj klopodoj, alvenis aviadile en Barcelono 15 bosnaj infanoj. Ili restados ĝis la 28a de Julio kaj ĉiutage oni organizos por ili aktivaĵojn kaj oni antaŭvidas 4 tuttagajn ekskursojn. Por gastigi ilin 15 katalunaj infanoj kaj gepatroj eklernis esperanton en Sabadell. La projekto "Bosnia defio" ampleksas aliajn erojn : eldonado de libro, eldonado de revuo, provizado de oficeja materialo, por kiuj estis starigita "fondaĵo Bosnio". Ĉiuj donacoj estas bonvenaj. Pri helpo al Afriko temas pri la venigo al Prago de juna aktivulo el Ganao.

En Majo 97 (vidu ankaŭ p.3) nia federacio kongresos en Figueres kun aliaj Sudfrancoj + Katalunoj.

Pri helpo al Bosnio - en Kataluna TV

Pri la help-programo de KEA al Bosnio kaj pri Esperanto informis Llibert Puig kaj Oscar Ariño dum naŭ minutoj tra la kataluna televidstacio TV-3, lundon la 13-an de majo enkadre de la programo "Bonan tagon Katalunio".

Urbestro gratulas la esperantistojn

Ĉi-marte vizitis Sarajevon la urbestro de Sabadell, Antoni Farrés, kaj skabeno pri sociaj aferoj kaj solidareco, Farmi Vallbé, por rekte pritrakti kun la lokaj respondeculoj la estontan antaŭviditan helpon, inter kelkaj proponoj, tiun de somera feriado en Katalunio de bosnaj infanoj, laŭ iniciato de KEA (Ka-

taluna Esperanto-Asocio). La Asocio peris la kontaktojn inter la sabadelaj aŭtoritatoj kaj sarajevaj geesperantistoj, kiuj gastigis ilin kaj faciligis la surlokaĵajn interrilatojn.

Reveninte, la urbestro gratulis KEA pro la efiko de niaj ambaŭflankaj organizaĵoj.

(Llibert Puig)

Kongreso eŭroregiona

Danke al la fluaj rilatoj kun la transpireneaj najbaroj, pli ol 20 okcitanaj esperantistoj partoprenis nian kongreson. Jam de pluraj jaroj nia asocio tenas bonajn rilatojn kaj ridige kunlaboras kun la esperanto-federacioj de Lengadoko-Roselono kaj Centra Okcitanio (ĉefe el Tuluzo). Tial KEA proponis organizi komunan aranĝon en 1997, kiu povus kunigi la kongresojn de la tri asocioj. Tiu invito estis tre pozitive ricevita, kvankam decido ne alvenos antaŭ la maja vizito de kataluna grupo al la Lengadok-Roselona kongreso.

Loko por la aranĝo ankoraŭ kompreneble ne estas decidita, sed kredeble ĝi okazos en Figueres. Nomon oni same priserbumas. Tre eblas, ke ĝi rilatos al la Eŭroregiono, kiun triope konsistigas Katalunio, Lengadoko-Roselono kaj Centra Okcitanio. Plaj verŝajne por la unua fojo okazos kongreso, ne nur esperantista, kuniganta homojn el tiu areo.

Sainte Foy d'Aigrefeuille

Les Français parlent aux Ukrainiens en espéranto

Ils sont là ! Exténués par trois jours et trois nuits de voyage en car, mais ravis d'être arrivés à bon port. Escortés de Larissa, leur professeur de musique, neuf petits écoliers ukrainiens viennent de rejoindre leur famille d'accueil à Sainte Foy d'Aigrefeuille, où d'emblée, le contact a été établi en... espéranto ! Car c'est là que réside l'originalité de l'histoire : Par le jeu des échanges entre espérantistes du monde entier, toute une chaîne de solidarité s'est mise en œuvre pour offrir des vacances en France à ces enfants de Kiev : il y a là le centre culturel espérantiste, le groupe des cheminots pour l'Espéranto, et surtout Claudie Hervé l'institutrice des CM1-CM2 de Ste Foy d'Aigrefeuille et sa collègue de Balma, Josée Lafosse professeur d'Espéranto, qui ont su motiver ici les enfants dans l'apprentissage de cette langue auxiliaire internationale (une initiative agréée par l'inspection d'académie)... Dans la foulée, les mamans s'y sont mises afin d'être capables elles aussi, de communiquer avec leurs futurs hôtes venus d'Ukraine, où l'étude de l'Espéranto est obligatoire dans le cursus scolaire... Depuis le début de l'année, tout ce petit monde découvre



Les jeunes ukrainiens, escortés de leur professeur de musique Larissa et du maire conseiller général de Ste Foy d'Aigrefeuille, Pierre Sicre qui, dans la perspective de leur séjour en Ariège leur a offert un ruck sac du conseil général.

ainsi la simplicité de l'espéranto : échanges épistolaires entre les enfants d'ici et de là-bas, collecte de fonds et en quelques mois, tout est calé pour accueillir

les neuf enfants qui séjourneront 15 jours à Ste Foy, visiteront les sites touristiques du Tarn avant de prendre leurs quartiers d'été 15 jours dans une colonie de va-

cances à Arout en Ariège...

Ecoliers de Sainte Foy d'Aigrefeuille et de Kiev évoqueront cette expérience aujourd'hui mercredi de 11 heures à 12 heures à radio « moun pais » (97.1)

"Prima de las lengas" -printempo de la lingvoj- disvolviĝis en Toulouse la 2an de Junio jam por la kvara fojo. Manifestacio, kiu hezitas inter populara festo kaj scienca lingvistika forumo, ĝi ebligas konigi esperanton (senkoste) al la tuluza publiko. Ĉijare la preleganto estis Istvan Ertl, hungara verkisto kaj ĉefredaktoro de "Esperanto". Juna, perfekte reganta la francan lingvon, li parolis lerte pri la neŭtraleco de esperanto kaj ĝia rolo kiel sezamo al alies kulturoj kaj respondis la interesajn demandojn de la publiko; "La Dépêche" aperigis artikolon pri esperanto.

MAJO 1997 meritos vian atenton.

Komence de la monato - vide p. 3

disvolviĝos sude en Figueres apud la landlimo komuna kongreso de Katalunio kaj Suda Francio. Ekde la 10a de Majo en Germanio sin sekvos Kultura Festivalo en Aalen, 60 Km-n oriente de Stuttgart, kaj EŭropUnia Esperanto-Kongreso (16-19 V) kiel en Parizo lastjare. Partoprenos homoj el pluraj eŭropaj landoj kaj la kongreso promesas esti sukcesa. Partoprenu tiujn internaciajn aranĝojn, ĉar la Universala Kongreso, la lasta antaŭ tiu de Montpellier, okazos en Aŭstralio, do malproksime.

Esperanta Kultura Festivalo
en Aalen (10/05-13/05/1997)
Eŭropa Junulara Parlamento
en Stuttgart (13/05-16/05/1997)
3a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso
en Stuttgart (16/05-19/05/1997)



Ĉe la Kultura Festivalo en Aalen kaj la 3a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso povas libere partopreni ĉiuj Esperantistoj... kaj kompreneble ankaŭ ne-Esperantistoj. Francio, Aŭstrio, Nederlando, Danio, Germanio oficiale partoprenos la Eŭrop-Unian Kongreson. Ĉe la Eŭropa Junulara Parlamento povas partopreni nur junuloj ĝis 30 jaroj, sed la du plenkunsidoj de ĝi okazos publike kaj estas malfermaj por ĉiuj. Do, faru krucon en via kalendaro kaj planu viajn feriojn dum tuta Eŭropa Esperanta-Kultura Semajno en Aalen kaj Stuttgart (Germanio).

Aliĝu frue (unua periodo ĝis la 15/02/1997) kaj vi ŝparos multel..
Pliajn informojn kaj aliĝilojn ĉe "Esperanto-France" (42 78 68 86)

INVITO

La federacia aŭtuna labor-kunveno okazos en BEZIERS, sabaton la 28an de Septembro en "Maison de la vie associative" ekde la 10a horo

(de la stacidomo, direkto Narbonne, unua strato maldekstre) :

(Re)organizado de la federacio - kompletigo de la komitato (kandidatoj bonvenaj) - varbado - forumoj de asocioj - staĝoj - kongresoj 97,98 - Sudfrancia Stelo -ktp. Anoncu vian partoprenon al nia sekretario J. Bony (adreso p. 9) aŭ al S. Authier. Estas invitataj la komitatanoj kaj ĉiuj agemaj esperantistoj. Ĝis !

DIVERSAĴOJ:

Kursoj: France Esperanto provas listigi ĉiujn E°-kursojn en Francio. Ne gravas de kiu (individuoj, grupoj, asocioj...) ili estas organizataj; gravas por la personoj, kiuj deziras lerni esperanton, ankaŭ por oficialaj instancoj, scii, ke ekzistas E°-kursoj dise tra la lando. Petu de nia sekretario kopion de la speciala demandilo aŭ sendu al ŝi detalojn pri la kurso(j) : kie, kiam, por kiu nivelo, kiu instruas, ktp. Anticipan dankon.


Legi: France Esperanto (UFE, 4bis Rue de la Cerisaie, 75004 Paris) proponas librojn kun interesa rabato (10,15%), senpaga sendo super 400 F, ktp. Oni mendas nun, oni ricevas kaj pagas la librojn post la ferioj. Mendilo havebla de la federacio (de J. Bony ankaŭ). Espereble alia oferto simila estos proponata en 1997.

Varbi: nia konstanta zorgo. Kiel jam plurfoje dirite, la tiel nomataj "forumoj de asocioj" estas la plej bona ebleco por nin konigi de la publiko kaj ankaŭ por varbi novajn lernantojn. La federacio proponas sendi iun al vi por helpi, alporti materialon kaj dokumentojn, ktp. Nura kondiĉo : informi sufiĉe frue. Kontaktu la sekretariojn (denove !) aŭ la vic-prezidanton Louis Ensuque (adreso p. 9) aŭ la prezidanton Jean Hénin (adreso sur la lasta paĝo sed li forestos ĝis la fino de Aŭgusto). Kiel konate, ESPERANTO ESTAS ĈIES AFERO !



DISTRA PAĜO

KRUCVORTOJ



Horizontale

- I) Plia stamp(o).
- II) Senegala verk(o).
- III) Blua Etiop(o) / Ciklon(o).
- IV) s : Antikva vesto / s : Profet'o / Cel(e) la belon.
- V) Sen ĝ(i), nek gajno, nek havo, laŭdire / Terpom(o).
- VI) Vi, certe ne !
- VII) Terblu(o) / Sufikso / Meze de stelo.
- VIII) Stonborul(o) aŭ leonpied(o) / Du el tri.
- IX) Parol(o) aŭ parolant(o).
- X) Ĉu do fiagont(o) ?

s : sone

Vertikale

- 1) Postelira bilet(o).
- 2) Stranget(a).
- 3) Blanka Sudanan(o) / Maligna tumor(o).
- 4) s : Afrika kun lando / Duonaklamo / Pretig(i) kampon.
- 5) Mezura movad(o) / Inul(o).
- 6) Palestina "rozo".
- 7) Tagar(o) / En tubo / Pere hazard(i).
- 8) Lernend(a) de VI / Mezurunu(o).
- 9) Enkorpa kanalet(o).
- 10) Spertul(o) pri biletoj.

Solvoj de la 136a

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	M	A	N	U	S	K	R	I	P	T
II	A	M	A	R	I	L	I	D		R
III	N	A	J	B	A	R		E	G	O
IV	U	Z		A	M		R		L	F
V	F	O	I	N		H	I	G	I	E
VI	A	N	T	I	S	E	M	I	T	
VII	K		A	Z	A	R	O	L		G
VIII	T	A	K	I	K	A	R	D	I	A
IX	U	P	A	S		K	S	A	N	T
X	R	E	N	T	U	L	I	N	O	J

B. BERTHONNEAU



Mafalda

El "Koncize"

La venonta numero de "Sudfrancia Stelo" aperos komence de Oktobro. Viaj kontribuoj estos atendataj ĝis la 28a de Septembro. Anticipan dankon !

SFS de Jean Hénin, Beauregard
Route de Montcayroux 48500 La Canourgue
Tel/Fakŝilo : 66 32 86 36

